

## Grandioza Finalo ĉe La Globo

Supozu, ke vi volas fari rezervon por la adiaŭa vivspektaklo ĉe La Globo, kiam la Ekosistema Cirko alvenas al la fino de sia rekorda tutmonda turneo. Tio ne estas entrepreno por la malfortaj koroj. La Globo estas unu el la plej ekskluzivaj scenejoj en la tuta universo. Por mendi vian lokon por atesti la amasan estingon, kiu finos ĉiujn amasajn estingojn -- okazaĵo, en kiu formortos almenaŭ 10 milionojn da specioj de kompleksaj plurĉelaj vivoformoj -- vi bezonos vere superhoma persistemon.

Antaŭ ĉio, vi bezonos paciencon. Vi devos atendi tre longe, pli ol ok miliardojn da jaroj de la Praeksplodego. Tio necesas ĉar via plej bona ŝanco por vidi la ekstermadon de 10 milionojn da specioj de kompleksaj vivoformoj estas trovi ie kun pli ol 10 milionoj. Por tio vi bezonos galaksion. Nu, ne mankas tiuj, sed vi bezonos iun kun bonkonduktema mezpeza stelo lokita en relative trankvila regiono de tiu galaksio. Ankaŭ ekzistas multaj tiaj, sed tio, kion vi bezonas, postulos, ke bona disĵetaĵo de kosma detrito, kiel karbono, oksigeno, nitrogeno, silicio kaj fero, estu verŝita en rokajn planedojn dum ĝi formiĝas. Tio postulas atendi ĝis konstanta provizo de supernovaoj eksplodigis tiajn aĵojn en la spacon antaŭ ol via stelo naskiĝos. Ne forgesante ŝprucadon de radioaktivaj elementoj, ĉar via planedo bezonos agrablan varman kernon, kiu ne malvarmas tro rapide. Tial la longa atendo.

La atendado ne finiĝas tiam. Vi devos trovi planedon, kiu konservas likvan akvon sur ĝia tersupraĵo dum pluraj miliardoj da jaroj, escepte du aŭ tri neĝglobaj eraoj, kiam la akvo devas kaŭri sub planede glacia plato. Tio implicas, ke via planedo unue bezonos multan metanon kaj karbonan dioksidon en la atmosfero, dum ĝia juna suno marŝas ĝis plena brilo, aldone, maniero por ĉerpi metanon post ĉirkaŭ miliardo da jaroj, kaj poste, ĉerpadi la plej grandan parton de la karbona dioksido dum proksimume alia miliardo da jaroj, dum tiu suno varmiĝas.

Antaŭ tiam simpla vivo probable komenciĝus. La vetŝanco kontraŭ tio ne estas ekstrema. Sed vi ankoraŭ bezonos kontroli egan nombron da mondoj, aŭ havas multegan bonsorton, por trovi planedon, kie ekestas kompleksaj organismoj; kaj vi bezonos abunda pacienco, ĉar eĉ kun tiom da bonŝanco pasos preskaŭ kvar miliardoj da jaroj. Dum tiu tempo via planedo povus trakti plurajn gravajn frapojn de asteroidoj, sed ne planedamasan kolizion.

Eĉ se via planedo atingas tiun staton sen ruino, ekzistas nenia garantio, ke ekestos konsciaj estaĵoj, kiuj scias regi fajron, konstrui radojn, elpensi skribon, fabriki armilojn kaj kompreneble ekhavi la ideon de akciaj korporacioj. Por trovi planedon kun tiaj estaĵoj, vi bezonos alian eksterordinaran tranĉaĵon de sorto, aŭ nekredeble malfacila serĉado. Sed se vi ŝancas sur tia bizarega planedo, via atendado preskaŭ finiĝos.

La sola kondiĉo, kiun vi tiam bezonos, estas multaj da tiuj kreitaĵoj, miliardoj da ili -- homoj kiel ni, alivorte, kiuj opinias, ke kontraŭbatalante partia sistemo estas admirinda formo de registaro, kaj kiuj lasas niajn estrojn konvinki nin, ke korporacioj havas neforpreneblan devon, ke ili ĉasu profiton antaŭ ĉio. Tiam finfine, en nuraj jardekoj, vi povos spekti la ekstermon de 10 milionoj da multĉelaj specioj (pli-malpli) inkluzive de ni.

[Richard Forsyth, Januaro 2020.]